



Estrara Komunikado (EKO) 2015-14. Sendita el Roterdamo en la 25a de aprilo (plejparte de restoracio *Hongkong*).

## Estraraj diskutoj: la unua tago en Roterdamo

La kunsido okazas en la 23a, la 24a kaj 26a de aprilo, kun paŭzo en la 25a por la Malferma Tago de la Centra Oficejo, kie aktivis la estraranoj. Partoprenas la kunsidojn Mark Fettes (MF), Martin Schaeffer (MS), Barbara Pietrzak (BP), Lee Jungkee (LJK) kaj Stefan MacGill (SMG). Ne povas partopreni Stefano Keller (SK) kaj José Antonio Vergara (JAV). Ĉeestas parttempe la direktoro de la CO (Osimo Buller) kaj aliaj oficistoj. Partoprenis Katalin Kovats dum la traktado pri Kapabligo, kaj Nico Huurman pri TEJO. Ni resumas la diskutojn el ĵaŭdo la 23a de aprilo.

### Konsciigo

Plie traktita poste. La baza hispanlingva varbilo uzita en Bonaero ricevos francan version (aŭ ekvivalenton) por uzo en Lillo, kun plurlingva versio (ekz. SK, CZ, HU, PL) por Nitra.

### Kapabligo

#### ILEI

La 48a Konferenco en Ostendo (BE), altiris jam 110 partoprenantojn. Solidan programon proponas la Tria Tutmonda Kolokvo en Neuchatel (CH) mezmaĵe. Ekas planoj inter UEA kaj ILEI por 2016, kiun nia Strategia Laborplano de UEA baptis 'La Jaro de la Lernanto', simile pri la ekstermovada 'Tago de Eŭropaj Lingvoj' en septembro.



#### Edukado.net

La paĝaro estas 14-jara, kaj altiras meze 3000 vizitojn monate. La RISKOLUDO altiras multajn. La unuaj sukcesintoj de la reta trejnado por instruistoj (RITE) estos anoncitaj en Lillo, kulmine de trijara laborado ĉe kursanoj.

#### KER-ekzamenoj

Diskutite, kiel UEA pli forte elstarigu la ekzamenojn – precipe pri la sesio en UK. Planata estas nova nivelo A2, cele al novaj kursanoj, precipe sed ne nur junaj. La ĉefa Internacia Ekzamentago en la 30a de majo jam allogis pli ol cent kandidatojn.

#### AMO (Aktivula Maturigo)

Okazis en 2015 jam du seminarioj (BR, IT), tri pliaj estas aprobitaj (SE, NP, CU), unu plia fariĝis malcerta, sed restas kvin pliaj kandidatoj, nun aktive konkretigataj.

Diskutite la plano por akiri administranto(j)n por la AMO-programo ekde 2016, por distribui la laborŝarĝon. Esplorote ĉu la volontula programo de E-urbo Herzberg povos liveri solvon; alie la ofico estos reklamata.

#### SES

UEA aŭspicias la Someran Esperanto-Studadon en Martin (SK), en julio 2015 kaj disponigas sumon de €500 por faciligi la partoprenon de induloj.



## Universitatoj

La trijara studado en Poznano (UAM) bone progresas, preskaŭ ĉiuj kursanoj plenumas la postulojn. La katedro en la Universitato de Amsterdamo kontentige progresas. Celatas dua universitata konferenco, kiel tiu el 2008, eventuale iuseptembre en Poznano, lige kun studsesio kaj Arkones. Nitra malfacilus, pro la intencoj okazigi Nitobe-Simpozion (aŭ ekvivalentan).



## Komunumo

### Montevideo 60 kaj Lillo

Resumita la projekto M60, kiu celas fortigi la rilatojn kun Unesko. UEA multon proponis pri tio, la reagoj el la diversaj landoj tre varias. Starigata retpaĝo por la iniciato, kiu daŭras ĝis la fino de 2015. Okazos kunsidoj pri M60 en Lillo. Starigindas laborgrupo kun membroj en landoj, kie funkcias la rilatoj kun la enlanda Unesko-komisionoj. Proponoj al Unesko falos, se ne eblas mobilizi tri landajn komisionojn subteni ĝin, i.a. tial gravas tiu laborgrupo por rapide arigi tiajn apogojn.

### Libroservo

Tio ne prosperas tra lastaj jaroj; malgrandaj ekstereŭropaj UK negative influis. La estraro aprobis eldonon de presita katalogo kun elektitaj titoloj, kun reta varianto, kiu funkcias en saĝtelefonoj.

### Delegita Reto

Esplorata la ideo iom longperspektive proponi retan version de tio, kun multe pli flekseblaj serĉebloj. Indus fari pliajn servojn por Delegitoj, por pli alte valorigi la oficon.

### Eldona agado

Baldaŭ aperos serio da lingvorilataj eseoj el Belartaj Konkursoj, nova reviziita eldono de 'La Danĝera Lingvo' de Ulrich Lins, aktoj de la Esperantologia konferenco el Rejkjaviko kaj en la dua jarduono suplementita reeldono de la delonge elĉerpita verko 'Esperantaj Sinonimoj' de Jan Ojalo. Pluraj pli longdaŭraj projektoj estis skizitaj. (Aperis, €6,90)

### Serio Okcidento-Oriento

Aperos ĝis Lillo du pliaj verkoj en tiu renoma serio: numero 50 estos poemaro de Wisława Szymborska (1923-2012), 'Ni inventas la mondon', tradukita el la pola, eldonota en Pollando, (nun aperinta: €20.70). Numero 51 estos 'Ponto super Drina' de Ivo Andrić, eldonota en Kroatio.



### Retejo por la revuo Esperanto

Diskutitaj diversaj vojoj por realigi tion, sen forpreni la atenton de la redaktoro de la taskego pretigi ĉiumonate freŝan numeron.

### Ĝemelaj urboj

La Estraro konfirmas la nomumon de komisiito, s-ro Wu Guojiang el Ĉinio, delonga redaktoro de la tiutema retrevuo.

Vortoj: 690

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe:

[http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado\\_kun\\_LA,\\_FA...](http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...)

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunajo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.